# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

5 bis

Jarkolekto
Jaargang 3 N° 5 - jul. aug. sept 1983

## Notendaj datoj kaj faktoj

17 09 1983 : Kadrokurso pri turismo
Loko : Bruselo, Gretrystrato 26
Info : Marc Demonty, Missionarissenstrato 39/5 1080 Bruselo
Tel. 02/520 19 44

17 09 1983 : Hasselt, Kultura Centro, Kunstlaan 5
Inform-posttagmezo
Info : ESPERANTO LIMBURG, Justus Lipsiustrato 26, Hasselt
Tel. 011/22 74 23

22 10 1983 : Charleroi : ĝenerala jarkunsido de Belga Esperanto-Federacio

Semajnfino de 28 - 31 10 1983 : JUNULARKONGRESO en Wavre
dum kiu okzos cetere estrar-kunsido de FEL.
Tiu ĉi kongreso povos esti vizitata de ĉiu interesito.

Info : Jan ERREYGERS
Weldadigheidsstraat 26
3000 LEUVEN

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto.
Jarabono : BF 150,-

---

| | |
|---|---|
| FLANDRA ESPERANTO-LIGO | Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00<br>Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 |
| Prezidanto<br>Informado/Planado/Agado | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT - 03/666 62 66 |
| Estrarano pri Financoj | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97 |
| Sekretario | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL 03/449 50 06 |
| Direktoro de GCA<br>Librotenado | Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN |
| Junularo | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL 03/449 50 24 |
| Intergrupa Agado | Hilde Van INGELGEM-VANDRIESSCHE , Arbeidstraat 21<br>9300 AALST<br>Trees DOOMS, Knaptandstraat 36<br>2700 St. Niklaas |
| Provincaj prezidantoj | Brabanto : M. Th. HENQUINEZ, Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK<br>Limburgo : Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN 011/53 64 10<br>Okc. Flandr.- Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE 050/33 00 04 |
| Kadrokursoj | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN |
| Gazetara Servo | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b.4, 1500 HALLE |
| Sciencoj | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT |
| Cibernetiko | Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT |



# P R O T O K O L O

pri la estrar-kunsido de sabato 03 09 1983 en Esperantodomo Antverpeno.

---

Ĉeestis : Edw. Symoens (ES), Paul Peeraerts (PP), Christian Declerck (CD)
Erik D'Hondt (ED), Kristin Tytgat (KT), Jules Verstraeten (JV),
André Staes (AS), Roland Rotsaert (RR), Guido Schroeyers (GS)
Hilde Van Ingelgem (HVI) kaj Jan Bovendeerd (JB)

Petis senkulpigon : Treed Dooms (TD) pro profesiaj devoj.

Prezidis : ES

Protokolis : JB

Komenciĝo : 10.15 h.

## T A G O R D O

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 04 06 1983 estas aprobita; tiu pri la kunsido de 09 07 1983 estas malaprobita kaj, do, ne publikigota. Tiuj, kiuj tamen ricevis kopion de la projekto estas per tiu ĉi vojo petataj konsideri ĝin konfidenca.
   La oficiala protokolo pri tiu ĉi kunsido estas tiu de FLEJA.
2. Raportado de la estraranoj pri plenumotaj/itaj taskoj. : nenio speciala.
3. Eldono de libro de Van Dooren (Jaĥto veturas for)

   Esperanto-Centro ricevis manuskripton de verko de S-ro Van Dooren. Nia komisiito pri Literaturo kaj Eldonoj CD, post priekzamenado kaj korektado raportas favore. Li opinias la verkon valora por eldonado.
   Finance la eldono estas ebla laŭ PP. Nia fonduso pri eldonoj ĝis nun kolektis el la donacoj ± 36.000 F. Tiu ĉi sumo pli malpli sufiĉos.
   La propono pri eldonado de la verko estas unuanime aprobita de la estraro.
   Pri la cetero okupiĝos PP.
4. FINANCOJ

4.1. Buĝeto : Nia komsiito pri buĝetado kaj subvenciado (Roger De Schepper) ankoraŭ ne komencis la ellaboron, sed jes jam kolektis la necesajn elementojn. Li ekos antaŭ longe.

4.2. Financa situacio :

4.2.1. Donacoj

4.2.1.1. La leĝo rilate al la imposta subtrah-rajto de la donacoj superantaj minimume BF 1.000,- ŝanĝiĝis ekde 01 01 1983. La teksto tamen ni ricevis nur antaŭ nelonge.
FEL verŝajne sen grandaj problemoj povos pluprofiti la avantaĝojn de tiu leĝo, kvankam eblas ke por 1983 ne plu estos eble aranĝi la aferon.

4.2.1.2. Kondiĉoj ( inter aliaj ) :
Nur 20 % de la monrimedoj povas esti uzataj por la administrado de la asocio, dum minimume 80 % devas servi por ĝia vera celo.

4.2.1.3. Tiuj ĉi kondiĉoj, ne preskribitaj de la antaŭa leĝo, verŝajne estos kaŭzo de la forfalo de la avantaĝo por la jaro 1983.

4.2.2. La financa situacio nun estas pli bona ol antaŭe dank'al diversaj ŝparoj.

4.2.2.1. Tamen, nia membraro nombras ankoraŭ ± 150 malpli ol la antaŭan jaron, dum kreskis la nombro de abonantoj.

4.2.2.2. La elspezoj restis ene de la buĝeto.

4.2.2.3. La enpsezoj superas la prognozojn, kvankam ili ankoraŭ ne plenigas la deficitan truon.
Enspeziĝis pli el la anoncoj, librovendado, abonoj al ESPERANTO PANORAMA, INFORMILO, KONTAKTO. MONATO (la abonado al ESPERANTO de UEA malpliiĝis).
ESPERANTO PROGRAMITA enspezigis nur ± 4 % de la prognozo ; la korespondа kurso nur ± 8 %.
La donacoj ĝis nun atingas ± 50 % de la prognozo.

4.2.2.4.1. La eldon-fonduso, kondiĉe ke la donacoj pludaŭru (ĝis nun nur 2 (du) personoj ĉiumonate ĝiras po FB 100,-) permesos eldoni unu verkon jare.
Por altiri pli da monatajn ĝirojn, decidiĝas enmeti la eldon-konton en la venontjara formularo pri aliĝo kaj mendoj cele al rekta elpreno el la bankkonto fare de FEL.

4.2.2.4.2. ES disponas pri gravaj nederlandlingvaj tekstoj eldonotaj.
PP faros la necesajn kalkulojn kaj raportos pri la eldon-ebloj.

5. <u>FLEJA - subvencio "Hoher Knüll"</u>

5.1. Rilate al la junular-kongreso kiu okazis antaŭ kelkaj jaroj en Hoher Knüll (Germanio), FLEJA ricevis de la germana ministerio pri internaciaj kulturaj aferoj, BF 20.000,- por vojaĝkostoj. Tiu sumo tamen estis ĝirita en la konton de FEL. Pro la fakto de FLEJA ne tuj bezonis la monon, ili decidis lasi ĝin en la konto de FEL. Nun ili bezonas la monon, sed, se en la librotenado de FEL aperas pago de BF 20.000,- al FLEJA tamen sen ia difino, ne estas ia spuro en la librotenado de FLEJA. Dubo do ekzistas rilate al - jes aŭ ne - pago de la subvencio ĉar ja la pago fare de FEL ankaŭ povas koncerni ion alian.

5.2. Proponita solvo : duonigi la diferencon per pago de BF 10.000,- al FLEJA kiu sia-vice promesas reinvesti la sumon laŭeble pere de la Verda Konto de FEL.
Konsentite.



6. <u>JUBILEA JARO</u>

6.1. Ĉu pri la tuta jubilea programo okupiĝu nur la kernestraro aŭ ĉu tio estu la tasko de aparta komisiono ?

6.2. Elektiĝas la dua solvo, dum kompreneble la respondeco restas ĉe la estraro. AS akceptas estri tiun komisionon.

6.3. Proponiĝas profiti la venontsemajnan kongreson en Leuven por kunigi pretajn kunlaborontojn kaj poste kunsidi por detale pri-ekzameni la programon de UEA.
Konsentite.

7. <u>Diversaĵoj</u> :

7.1. ES eksiĝis el la "Raad voor Cultuur v.d. Prov. Antwerpen". Nun tiu "Raad.." petas anstataŭanton. Akceptas tiun postenon JV.
La sekretario okupiĝos pri la administra enordigo.

7.2. La Interliga servo de la Mondojaro pri Komunikado (Verbindingsbureau van het Wereldjaar over Communicatie) organizos en Bruselo, je 14 09 1983, oficialan eskpozicion pri komunikado kaj de 22.11 ĝis 08 12 1983 seminario pri komunikado. ES, kiu estas en bonaj rilatoj kun kelkaj oficialuloj, opinias ke ni nepre partoprenu. Li pretas ĉeesti. Konsentite.

7.3. Pro la forpaso de karmemora CH. Poupeye kandidatiĝas kiel delegito por Bruĝo Fernand Roose. RR, respondeculo por Okc. Flandrio, raportas ke ne estas kontraŭstaro se ne estas alia kandidato. JB faros la administrajn paŝojn ĉe la sekretario de BEF.

7.4. <u>Libroservo / SONORILO</u>
Ĉar la rilatoj kun SONORILO ne povis esti aranĝitaj kontentige, FEL do distanciĝas de ĝi kaj kreas sian propran libroservon.
Ĉiu do iru sian propran vojon.
Por pli da detaloj, i.a. pri la praktika funkciado de tiu servo, vidu la FLEJA-raporton.

Fino de la kunsido : 13.00 h.

JB

-----------------

## LEUVEN - 09 - 11 09 1983 - LA KONGRESO

Kvankam la kongreso koincidis kun trajnstriko, partoprenis 78 personoj. Tion ni nomus "amasa partopreno", sed ni jes povas diri, ke la partoprenantaro estis interesa publiko. Efektive, ĉiuj kongreseroj konis sufiĉan intereson kaj la programo estis vasta.

Jenaj temoj pritraktiĝis : internacia komunikado (cetere LA temo de la kongreso) prelego prizorgata de Paul Kempeneers; komunikado, vidpunkto de minoritata plejmultano (Petro De Smedt); gazetara agado ( Germain Pirlot); E.K.-tradukservo (Angelo Tsirimokos); Eŭropa Esperanto-Centro (Anne Tilmont); mondlingvaj projektoj (Fernand Roose).

Krome okazis gazetara konferenco gvidata de Ivo Durwael; Esperanto-kurso por progresantoj (Kristin Tytgat); rakontoj de Onklo Gustavo (Rik de Roover); klasika dancado (Paul Peeraerts); vizitoj al la urbo Leuven, al ĝia beginejo, al la rezidejo Arenberg (Marie Thérèse Henquinez).

Plie, kadre de la Flandra movado, okazis seminario pri intergrupa agado kaj, je dimanĉmateno, ĝenerala FEL-kunsido.

La kultura programo estis speciale interesa : vendred-vespere Myriam Geirnaert prezentis unu-horan "mimo-artaĵon", ege interesan. La sabat-vespero estis prizorgata de "Jan en Alleman" per tipa popolmuziko el flandraj regionoj kaj la ĉirkaŭantaj landoj. La dimanĉan adiaŭprogramon prizorgis Tiana Moons per ege agrabla kantado, akompanata de Petro De Smedt.

En la inaŭgura festsolenaĵo paroladis S-ro Willy Kuypers anstataŭ Honora Senatano Coppieters, malhelpata pro malsano kaj S-ro Van Ŝina, urbestro de Leuven. Speciale notenda el la parolado de S-ro Kuypers estas lia promeso agadi favore al Esperanto sur politika tereno. Li i.a. konsideras komunikadon ne nur tradukado, sed ali-lingvigado, transigo de vivkonceptoj cele al pli homa kunvivado. Pro tio li opiniis, ke Esperanto estas la plej bona rimedo, plej taŭga komunikilo per kiu eblos, sen emocia valorigo de la propra lingvo, vere komuniki unu kun la alia senkonsidere al nacio aŭ lingvo. Jen fakte kion li promesis favore pritraktigi de la instancoj politikaj.
Ĉu ne interesa detalo, kiun ni devas ne forgesi ?

Ankaŭ Urbestro Van Ŝina tre favoras Esperanton. Li paroladis sam-teme kaj eĉ parte en Esperanto.

Plej gravaj eroj el la kongresa programo estis por FEL kompreneble la seminario pri inter-grupa agado kaj la ĝenerala kunsido.

En la seminario pri intergrupa agado, gvidata de Hilde Van Ingelgem kaj Trees Dooms, Anne Tilmont donis kelkajn konsilojn pri "kiel varbi novajn membrojn";



André Staes prilumis la kadrokursojn kaj Paul Peeraerts memorigis la kreadon de la "Manlibro por Esperanto-aktivuloj" kaj klarigis ĝian uzon.
Poste sekvis debato dum kiu konstatiĝis ke la granda problemo solvenda estas fakte la ĝenerala malĉeesto de plejmulte el la grupestroj. Bone ke la estraro faras ĉion eblan por kontentigi la membrojn kaj por trovi taŭgan kunlaboradon, se la grupaj respondeculoj ignoras tion aŭ trovas nenecese sekvi la konsilojn aŭ esprimi siajn dezirojn, al kio servas tiujn penojn?
Plia kaj el la diversaj diskutelementoj sekvanta konstato estas ke inter teorio kaj praktiko kuŝas marlarĝa distanco.

Konklude decidiĝas, do, klopodi trovi la rimedojn por interesigi la grupestrojn kaj venigi ilin al la planitaj kunsidoj.

Plia atendigo - kaj alvoko al kunlaborado en ĝia programo - estas la financa situacio.

Dua grava ero el la ĝenerala programo estis la ĜENERALA KUNSIDO DE FEL je dimanĉo 11-a de septembro je la 10.00 h.

En la tagorodo troviĝis : la 5-jara jubileo de FEL, retrorigardo, planado, komunikado.

En sia retrorigardo, la sekretario sin demandis ĉu en la daŭro de la pasintaj kvin jaroj, la estraro sukcesis akiri la fidon de la membraro.

FEL kreiĝis en oktobro 1978, sub la provizora gvidado de Fernand Roose (prezidanto) kaj Roger Iserentant (sekretario). Tiu provizoreco daŭris ĝis la unua ĝenerala kunsido en marto 1979, okaze de kiu Fernand kaj Roger rezignis pri la provizoraj postenoj. La tiam elektita estraro konsistis el 4-5 persona kerno, kies unuaj taskoj estis i.a. redakti la statuton (ege temporaba kaj streĉa laboro) kaj organizi la movadan agadon kaj ĝian administradon. Grandioza laboro, aventuro fakte, en kiu neniu alia riskis partopreni.
Tamen ekestis nova agado diversloke, ekz. en Aalst, St. Niklaas, Leuven kaj Limburgo, dum bedaŭrinde la aktiveco en aliaj malnovaj grupoj stagnis por ne diri malaperis.

Aliflanke la kadrokursoj, organizitaj en 1981, konis grandan sukceson kaj liveris cetere jam kelkaj tre valorajn aktivulojn.

La 1982-a Universala Kongreso en Antverpeno estis la granda trarompo. Ĝi ekhavigis al ni diversajn tre aktivajn personojn kiuj permesis plilarĝigi la estraron al la amplekso kiun ĝi nun havas (vd la organigramon).

Surbaze de tiuj elementoj JB opinias ke la fido de la membraro jes estas akirita. Kiel ekspliki, se ne, ekzemple la aktivan ekster-estraran laboron de la laborgrupo pri financado de FEL, ĝia aktiva esploro de la enspez-eblecoj por resanigi la financan situacion de FEL k.s. ?

Vere, lastatempe FEL renkontis multe da spontanea kunlaboro diversflanka. Ĉu tio signifas ke nia membraro estas preta kunmeti la fortojn ? Jen ĝojiga kaj kuraĝiga fakto, kiu devas permesi taŭgan planadon. Se nia celo estas konstrui kiel eble plej bone funkciantan organizon, nepra kondiĉo estas bona komunikado intergrupa /-membra, ak_iri la necesan bonan volon kaj solidarecon. Ni devas esti pretaj - kaj la estraro tutunualoke - defendi la interesojn de la movado kaj la movado estas ni ĉiuj. Se iu grupo estas atakata (movade komprenebl e), FEL konsideru tion kiel atakon al si mem; se membro estas atakata, FEL same konsideru tion kiel atakon al si mem. Se tiel ni pretas agadi, ni ne devos timi la estonton. Nia devizo estu : kune fortaj ! Tio malfermos al ni la vojon al kolektiva agado, al harmonia kunekzistado, al honesta kunlaboro el kio ni ĉiuj profitos, ni kiel ankaŭ la tuta movado.

Ĉu niaj financoj permesas la planitan aktivadon ?
Laŭ Paul Peeraerts nia financa situacio evoluas pozitive. FEL disponas pri sufiĉe granda kapitalo por labori. Tiu kapitalo ne estas propraĵo de FEL sed deponita. Tio signifas ke FEL ne povos ĝin elspezi, sed nur investi.

Negativa fakto estas eble, ke FEL en la realo elspezas pli ol ĝi enspezas, kvankam la situacio pliboniĝas. Nome la elspezoj malpliiĝas. La plej granda ŝarĝo estas la salajra parto. Tiu ĉi povas esti malpliigata pere de transpreno de kiel eble plej multe da laborhoroj fare de volontuloj.

La financa situacio ankoraŭ ne estas sana, sed ĝi troviĝas sur la bona vojo.

La kvina ekzistojaro de FEL kaŭzas al ni alian problemon. Ĉar laŭstatute la funkcio de prezidanto estas ebla nur dum kvin sinsekvaj jaroj, ni devos, okaze de nia ĝenerala jarkunsido en venonta marto, elekti novan prezidanton. Por eviti ke tiam estu elektita la unuaveninton, JB proponas opinisondaĵon por koni la ĝeneralan preferon de la publiko kaj por jam permesi kontaktadon de la preferato(j) celo al eventuala kandidatiĝo . La propono akceptiĝas kaj jen la proponitoj en la sinsekvo de la voĉdonado :

- Marc Van den Bempt
- Ivo Durwael
- Trees Dooms kaj Jan Bovendeerd
- André Staes
- Kristin Tytgat.

El la posta debato rezultiĝas diversaj vidpunktoj.
Ekz. Anne Tilmont opinias, ke por bona redaktora laboro, necesas bona komunikado flanke de la grupoj kaj ceteraj interesitoj. Se ili ne ensendas siajn novaĵojn, estas normale ke ili ne aperas.
Ĝenerala reago tamen estas, ke redaktoro de movada revuo aŭ bulteno, devas



agi kiel kutima ĵurnalisto kaj "ĉasi" novaĵojn ekz. jam uzante la telefonon..

Ivo Durwael opinias ke ni evitu troan strukturadon, sed plibonigu la komunikadon ambaŭdirekte. Tio plej bone eblas per persona kontakto.

Sekvas diversaj aliaj ideoj, sed ĉiuj substrekas la neceson de reciproka komunikado. La respondeculoj pri intergrupa agado faras el tio sian ĉefan tujestontan laborcelon.

Ankaŭ sekvas diskuteto pri la rilatoj FEL/BEF/APE.
S-ro Maertens klarigas ke FEL kaj APE estas memstaraj asocioj, kiuj delegas siajn administrantojn al BEF kiel membrojn de la federacio, cele al la necesaj kontaktoj kun la oficialaj instancoj, la internaciaj kontaktoj kaj la rilatoj kun UEA.
Ĉar FEL, do, ne estas landa asocio, sed troviĝas sub la kupolo de BEF, petata estas, inter alie de Petro De Smedt, ke la statuto de BEF estu dissendota al la FEL-anoj. Tio ŝajne ne estas leĝe deviga - la demando eĉ leviĝas ĉu tio estas vere necesa - decidiĝas ke la sekretario disponigu la statuton al ĉiu kiu deziras tion.

Pri FLEJA raportas Kristin Tytgat.
Ŝi konstatas ke la rilatoj kun FEL estas regulaj kaj normalaj. Ekzemple ŝi mem aktive partoprenas la estraron de FEL nome de FLEJA, eĉ havas kun-decidrajton, dum FEL-estraro kaptas la akazojn kiuj sin prezentas por partopreni aktivecojn de FLEJA. Ekzemple la lastajn jarojn FEL-estraro profitas la ĉiujarajn junularajn kongresojn por okazigi estrarkunsidon kaj tiel do viziti la kongreson.

Kristin ankaŭ profitas la nunan okazon por inviti interesitojn de FEL al vizito de la venonta junularkongreso, kiu okazos dum la lasta semajnfino de oktobro en Wavre.

La ĝenerala kunsido finiĝas je 11.45 h. kaj estas sekvata de la jam menciita koncerto de Tiana Moons kaj Petro De Smedt.

JB

----------------

# F L E J A

PROTOKOLO PRI LA KOMUNA FLEJA/FEL-KUNSIDO DE SABATO 09 07 1983 EN ESPERANTO-DOMO EN ANTWERPEN.

---

Komenco : 10.30 h.

Ĉeestas : Jan Bovendeerd, Trees Dooms, Jan Erreygers, Paul Peeraerts, André Staes, Ite kaj Kiki Tytgat, Hilde Van Ingelgem, Jean Pierre Vanden-Daele.

Petis senkulpigon : Ilse Jacques, Wim Tytgat (ambaŭ feriante) kaj Edward Symoens.

T A G O R D O

Pritraktiĝis nur unu punkto, nome la planoj al komuna libroservo en la estonteco.
Dum la FEL-estrarkunsido en Leuven, je 17 06 1983 decidiĝis ke FEL disiĝas de Sonorilo.
Pro tio FEL esploras la eblecojn je kunlaboro al la jam ekzistanta FLEJA-libro-servo.
Proponiĝas du eblecoj :
- estu unu komuna stoko. FEL aldonas librojn al la jama FELJA-stoko.
- FEL aĉetas la bezonatajn librojn de FLEJA kaj inverse je aĉetprezo.
Tiu ĉi lasta ebleco estas akceptita je reciproka interkonsento.
Tiel FEL vendas librojn al la mendoj alvenantaj en la Esperanto-Centro, tie BJK-ano plenumas ĉi tiun servon.
FLEJA vendas librojn en la LVS-ejo kaj dum kongresoj.
Paul Peeraerts klarigas ke li havis telefonan kontakton kun S-ro Maertens, kiu substrekas pli la historian situacion. Pro tio decidiĝas nur provizore starigi libroservon kun FLEJA. La provizoreco povas iĝi definitiva se la Administrantaro de Sonorilo ne sanigas la nunan situacion.

Fino : 11.45 h.
Protokolanto : Jean Pierre VandenDaele.

------------------

PROTOKOLO PRI LA FELJA-ESTRARKUNSIDO DE 09 07 1983 EN ESPERANTODOMO ANTWERPEN.

---

Ĉeestas : Jan Erreygers, Ite kaj KIKI Tytgat, Jean Pierre VandenDaele
Petis senkulpigon : Ilse Jacques, Wim Tytgat (ambaŭ feriante), Anne Tilmont.

T A G O R D O

1. Interŝanĝo por IJK-Debrecen.

Ankoraŭ unu persono malpli ol 26-jara povas iri al Debrecen interŝanĝe al la kvin Hungaroj de Leuven.



2. Financoj.

2.1. En Leuven ni ricevu laŭeble superrigardon de la financoj de FLEJA (Ite)

2.2. Hoher Knüll-subvencio:
Pro malklara librotenado ne plu estas konstateble kio okazis kun la subvencisumo de BF 20.000,- de Hoher Knüll, pagita al la FEL-konto. Ĉar nek FEL, nek FLEJA plu havas la eblecon kontroli tion, FLEJA petas de FEL la duonan sumon, kiun FLEJA povas ĝiri sur la "Groene Rekening".

2.3. Ŝvitĉemizoj :
Ite esploros la eblecon havigi 50 blukolorajn ŝvitĉemizojn kun la vorto Esperanto kaj kun blanka stelo.

2.4. WAVRE :
4 Poloj restos dum 10 tagoj interŝanĝe. FLEJA pagos ilian restadon, elspezojn kaj poŝmonon (ĉiutage po BF 150,-) Dum la skeĉoprezentado en la lovena kongreso povas esti enigita ero por instigi la partoprenantojn finance kontribui al tiu projekto.

3. FLEJA-kongreso en Wavre (raportas Jan Erreygers)

3.1. Finance : enspeziĝas proksimume BF 50.000,- (FLEJA antaŭpago kaj kotizoj kaj antaŭpagoj de la partoprenontoj). Elspeziĝas proksimume BF 33.000,- (administrado, afrankado, farado de aliĝiloj kaj antaŭpago kongreseja por 150 personoj). Al la subvencipeto ankoraŭ ne estas respondita de la koncerna instanco. Jam aliĝis 36 personoj.

3.2. Programo (provizora):
Roel Dewolfs: ĝenerala enkonduko, Dré Staes: laborgrupo pri la temo de la ĝenerala enkonduko, Herman Mortelmans: prelego pri "juro kaj medio", Jan Erreygers: prelego "sunenergio",Rob Heusdens: prelego "alternativaj energifontoj", Dirk Deweerdt kaj kunlaborantoj: kabaredo, Ite Tytgat: libroservo (se ŝi ne devos labori), kursoj por komencantoj kaj progresintoj kaj eventuale lotumado aŭ interkona ludo. Jan esploros ludon de Herman Deceuninck.

4. JEN
Ĝis nun Katharina Frison preferas ne jam labori en la redaktado de EK. Pro tio Anne Tilmont daŭrige kompilas ĉi tiujn paĝojn. Ite kaj Kiki priparolos la agadeblecojn estontajn kun la koncernaj personoj.

5. Diversaĵoj :

5.1. Jean Pierre esploros la nunan situacion pri la planita nova faldfolio de FLEJA kaj raportos pri tio en la venonta kunsido. Koncernas la laboron kun Nederlando (kiu?), prezoferto, kiom da ekzempleroj.

5.2. Kultura Konsilio Antverpena :
Kiki petos al Anne ĉu ŝi pretas reprezenti FLEJA-n en tiu konsilio.

5.3. La sekvonta estrarkunsido okazos dum la FEL-kongreso en Leuven (09-11.09.83)

Fino : 15.45 h. Protokolis : Jean Pierre VandenDaele

--------------------

## K O M U N I K O J

Korektendaĵoj

En via organigramo bonvolu :
- aldoni en la estrara parto apud FINANCOJ :

komisiito pri buĝetado kaj subvenciado :
Roger De Schepper, Doornstraat 22
2610 WILRIJK 03/827 24 05

- korekti en la reprezentantaro de LA VERDA STELO - Antverpeno :

S - Paul Peeraerts, p/a Esperantocentro
anstataŭ André Staes.

- sub Bruĝo : Reĝa Societo : anstataŭigi CH. Poupeye per :

Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97
8000 Brugge 050/33 00 04

Okazontaĵoj

BRUSELO : Je sabato 17 09 1983 kaj dimanĉo 18 09 1983 okazos en Bruselo, Gretrystrato 26 KADROKURSO PRI TURISMO sekvota de dimanĉa ekskurso.

Temoj : 09.00 h. ESPERANTO-TURISMO (Grzebowski)
10.00 TURISMA LINGVISTIKO (Marc Demonty)
11.00 h. TURISMO KAJ FINANCOJ (Andre Mertens-Goossens)
12.00 h. TURISMO NATURHISTORIE ( A. GEYSELS)
14.00 h. TURISMA PLANADO (Leo De Bruyne)
15.00 h. TURISMAJ GRUPOJ - ĈICERONADO (Grzebowski)

Paralele kun la kadrokurso okazos ESPERANTO VAPOR-KURSO.

Info : Marc Demonty, Missionarissenlaan 39/5 1080 BRUSELO 02/520 19 44

HASSELT : Same je 17 09 1983 okazos en Hasselt - Kultura Centro, INFORMPOSTTAG-MEZO.

Gastprelegos S-ro COPPE el Embourg.

Info : ESPERANTO LIMBURG, Justus Lipsiusstraat 26, 3500 HASSELT
011/22 74 23

ESPERANTO HASSELT ankaŭ prizorgis informstandon en la granda inform- kaj hobi-borso en Hasselt je sabato 03 09 1983.

LEUVEN : Krom la kongreso, ESPERANTO 2000 prizorgis, dum la kongreso eĉ, informstandon en la granda informfoiro en Leuven.

Ĉe niaj amikoj Marc kaj Susanne Van den Bempt - Mommaerts naskiĝis filo Ronny je 14 07 1983. Kvankam tarde ni tamen uzas tiun ĉi okazon por gratuli la gepatrojn kaj deziri al la filo sanon kaj prosperon.

---